

Ludwig Heinrich Christoph Hölty,  
Printempa lido

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉielo bluas super mi;  
En tiu verda valo ĉi  
Floretoj buntas ĉie,  
Sur la herbej'  
En ĉiu ej',  
Floradas idilie.

Pro tio venu tien ĉi,  
Kaj ĝoju pri la mondo vi  
Kaj pri l' bonec' de Dio,  
Per kies fort'<sup>2</sup>  
Kaj kies vort'  
Fariĝis ja ĉi ĉio.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingslied" de LUDWIG HEINRICH CHRISTOPH HÖLTY (Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, \*1748-12-21 – †1776-09.01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-02-28.*

MR-72-1 / Arg-508-997 (2014-05-01 09:00:10)

---

<sup>2</sup>aŭ:

Kaj pri l' boneco Dia.  
Per Lia fort'  
Kaj Lia vort'  
Ekestis belo ĉia.